

Masaryk-filozofa

/ Dalibor Chalupa /

Havi sur la estra loko de la ŝtato prezidenton-filozofon, estas beno por tiu ĉi ŝtato. Kaj por Ĉeĥoslovakujo estas ĝia unua prezidento T. G. Masaryk, beno vera. Viro, elirinta el la popolo, trairinta la malindulgan lernejon de l' vivo, batalanto por la vero kaj rajto de sia popolo, saturita samtempe per la ideo de l' humaneco kaj homaraneco, tia viro estas predestinita gvidi kaj regi popolon. Prezidento Masaryk estas unuavice instruisto. Kiel universitata profesoro li havis okazon, pruvi sian edukistan talenton, kaj tiu ĉi talento ne forlasis lin dum lia tuta vivo. Ŝajnas, ke en li kvazaŭ reviviĝis la spirito de lia granda samlandano kaj instruisto de la popoloj, la spirito de J. A. Komenský-Comenius. Ne nur per vortoj sed antaŭ ĉio per agoj. Masaryk instruis la novtempan Ĉeĥon kaj Slovakon pensi science kaj kritike, agi honeste, kaj lia giganta laboro instruis lin labori serioze kaj respondece. Prezidento Masaryk estas unu el la eminentuloj, kiuj decide efikas, efikas kaj ĉiam efikas, kiel per sia ne atingebla ekzemplo, tiel per sia verdira vorto.

Hodiaŭ ĝisvivas la kreinto kaj unua prezidento de la Ĉeĥoslovaka Respubliko T.G. Masaryk la okdektrian jaron de sia vivo. Memorigante al ni kaj al eksterlando tiun ĉi benitan aĝon de nia plej granda viro de l' estanteco, ni unuavice akcentas lian filozofian verkon, kies praktika rezulto estas lia estrado al ŝtato kaj lia kapableco alligi ties fortojn al la nuntempaj okazantaĵojn tutmondaj.

Amikoj, aŭskultu kelkajn elĉerpaĵojn el lia filozofa verkaro, kiuj plej klare montras la grandecon de tiu ĉi viro.

Kio estas universala klereco? (El la libro : Kiel labori. Skribita 1898)

La universala klereco ne estas la tuteco de l' scio, ĉar tiam enciklopedia vortaro estus la plej bona ilo por klerigado. Homoj kun tia enciklopedia klereco ne imponas al ni. La universala klereco ne estas la tuteco de l' scio, ĉar la sciado estas viva organismo, io vivanta. Tio estas ni, kiuj pensas kaj laboras kaj universala klereco --: tio estas la tuta homo aŭ la tuta koncerna socio. Tial temas pri organizita sciado, ligita unu al la alia. Krome, universala klereco estas io pli alta ol izolita scienco, tial universala klereco ne estas instruiteco, troinstruiteco, kiu estas ordinare la sorto de l' specialigo, malpli universala klereco. Ne temas pri praktikeco, sed pri viva, organa sciado, natura ĉionscio.

Sed ni ne volas universalan klercon sen specialigo. Ĉiu universale klera homo devas esti krom tio specialisto; per tio li akiras precizecon. Ĝuste hodiaŭ estas granda la danĝero fariĝi duonklerulo, diletanto. Diletantisno estas kankro ne nur de l' racio sed ankaŭ de l' moralo kaj malbone influas la karakteron. Kiel la klereco faras el ni homon, tiel same ĝi povas fari el ni ankaŭ nehomon. Estas bona kaj malbona klereco. La klereco fariĝas ofte ĝuaĵo kaj oni uzas ĝin kiel nigran kafon. La kontraŭkuracilo estas kompreni, kio estas precizeco de l' laboro, kaj kio estas laboro detala.

Filozofio de l' ĉeĥa historio. Senco de nia historio. (El la libro: La ĉeĥa demando).

La tuta senco de nia historio estas: kompreni la celon de l' humaneco de l' flanko morala kaj racia, kompreni, ke la pura humaneco maldevas esti nur agitvorto, sed la peno de niaj inspirantoj al nova nacia vivo. Dobrovský, Kolár, Palacký, Havlíček, devas esti la peno de ĉiu el ni kaj de ni ĉiuj, ke humaneco kiel nia nacia celo kaj programo devas laŭprincipe regi ankaŭ nian nacian taktikon. Memorante niajn oftajn batalojn por nia ekzisto en tempoj pasintaj, kaj precipe la ribelon sur la altaĵo Bílá hora, finiĝinta per nia malvenko, nian falon, nian renaskiĝon dum la Franca revolucio kaj dum la epoko de l' racio en la pasinta jarcento, la revolucion en la jaro 1848, la polan ribelon . . . ĉio ĉi devigas la pensantan ĉeĥon al decido: Ne per forto, sed per paco, ne per glavo sed per plugilo, ne per sango sed per laboro, ne per morto sed per vivo al vivo; jen la respondo de l' ĉeĥa genio, jen la senco de nia historio kaj heredaĵo de niaj grandaj antaŭuloj.

La etiko en la praktiko. (El la libro: Socia demando. Skribita 1898.)

La etiko kaj la religio de l' amo ne estas nur por dimanĉo kaj festotago, sed ankaŭ por ĉiu semajna tago. Kaj nature, ni ne bezonas moralon kaj religion in abstracto, en sistemoj kaj libroj, sed ankaŭ en la vivo kaj ekonomio kaj politiko. La etiko ne estas por la skribotablo, la religio ne estas por la preĝejo. La tuta agado kaj pensado submetiĝas al la reguloj de l'etiko. La agado kaj pensado de ĉiuj kaj same....

La Demokratio ne estas nur sistemo politika, sed ankaŭ morala kaj antaŭ ĉio morala. La moderna etiko ne estas materialisma. Sociala solidareco havas malmultan laboron, se la tuta vivo estas en la matura cerbo. La moderna etiko kredas al progreso, kredas, ke per sociala solidareco evoluigos ĉiam pli fortaj individuoj. Individuoj, ne egoistoj.

El la libro: Idealoj humanaj.

La amo, humaneco devas esti pozitiva. Ofte oni opinias malamon, ekzemple al alia popolo, kiel amon al sia propra. Pli alta estas, ne havi tiun malamon, sed ami pozitive. Mi ne disputos pri tio, ĉu oni povas ami ion fremdan tiel, kiel propraĵon. Postuli tion, estus nenatura. Nian popolon, nian familion, politikan partion kaj kiun ajn ni kutimiĝu ami pozitive, tio estas sen malamo en la fono, kaj tute nova morala mondo malfermiĝos al ni ...

Ni devas kredi al progreso, ke la vivo de l' individuo kaj de l' tuto pliboniĝas, kaj ke estos ĉiam pli bone. Kiu kredas al progreso, tiu ne estas malpacienca. Progresi, tio signifas venki la malbonon. Malbonon venki per bono — tio ne estas tiel malfacila, sed malfacila estas, venki bonon per plibono. La naturo kreis la homon malforta, sed li ne estas ĝisfunde malbona. Tial ni povas daŭrigi en la kunago de l' ĉiuj.

Kio estas la fundamento de l' religio. El la libro: En batalo por religio. 1904. /

Nia religio devas esti *konvinko*, ne nur blinda kredo. Ni volas religion *spiritan*, ne *materian*. Ni volas pli altan *moralon*. Nia religio devas manifestiĝi per pli altaj kaj pli noblaj principoj moralaj; la moraleco devas esti super la kulto. Bonan ekzemplon donis al ni Jezuo: Jezuo ne simpatiis kun farizeoj, ne postulis multajn vortojn --- en soleco, de neniu vidata, li preĝis. De Jezuo ni lernu nian amon al *dio* koncentrigi al nia kunhomo.

Moderna religio ne kontraŭstaras necesajn, ekonomiajn kaj socialajn reformojn aktualajn, ĝi devas esti sociala; devas esti religio *ankaŭ* por malriĉuloj. Hodiaŭ necesas pensi sociale, *ĉiu popolo* devas memori la grandajn homamasojn, kiuj ne havas panon. Jezuo vizitadis volonte malriĉulojn, kvankam li manĝis ankaŭ kelkfoje ĉe l'tablo de riĉuloj.

En projekcio de l' eterneco. (El la manifesto de l' prezidento la 28. de oktobro 1919.)

La idealojn de l'humaneco kaj demokratio mi ĉiam rigardis sub *specie aeternitatis*. La milito kaj ĝiaj kruelaĵoj instigis kaj instigas al meditado pri la religia problemo. Mi trovis en la religio la idealon de l' vera perfekteco kaj en ĝi objektivan mezurilon por ĉiu homa agado. Tiu ĉi idealo de l' perfekteco instruas la homon eviti malvastanimecon kaj bagatelaĵojn. La sento de l'eterneco igas nin modestaj, plifortigas la senton de l' morala respondeco kaj gvidas nin al rekono de l'universala harmonio. De tie ni ankaŭ ĉerpas komprenon de la tutmonda kaj sociala evoluo kaj perfektigo. Nia kredo al progreso plifortiĝas kaj ni ekkomprenas, ke ne eble estas atingi ĉion per unu fojo. Oni povas diri, ĝi instruas nin esti pacienca, sed neniel pasiva; kontraŭe, la ekkompreno de la tutmonda kaj sociala ordo kaj laŭleĝeco instigas nin ĉiujn al energia kunlaboro.

Th. Kilian